# Frosto

Havas frosto la penikon
sorĉitan,
per ĝi faras artifikon
subitan,
pentras sur fenestroglaco
betulon,
faras el la lagsurfaco
spegulon.
Pro la frosto pendglacioj
mamutas,
sed sub varmaj sunradioj
gut-gutas.
Frosto kisas la infanojn
kaĵole,
pinĉas vangojn, pinĉas manojn
petole.

